



Unum ovile et unus pastor.
Unu safejo kaj urtu pastanto.
(Joh. X, 16).

ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO

Oficiala organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
(I. K. U. E.) de P^{RO} Richardson.

Pri „Espero Katolika”

Tre ĝojiga estas la fakto, ke post la reapero de E. K. la fervoro de la katolikaj Esperantistoj ĉie estas vekita kaj ke ni ricevas ĉiutage pli da signoj de vivo kaj agado. —

Ni dissendis ĝis nun „Espero Katolika” al ĉiuj konataj adresoj. Multaj jam sendis abonmonon aŭ promesis fari tion. Sur la banderolo (koverto) de la proksima Aprila numero 127 de E.K. ni presigos per stampilo, ke ni ricevis la abonmonon; tiun banderolon oni do povos konsideri kiel kvitancon.

De nun ni ne plu sendos EK al ĉiuj konataj adresoj; almenaŭ tiuj, kiuj ne ankoraŭ pagis la abonmonon, aŭ kiuj ne sciigis ke ili abonas, aŭ kiuj ne petis, ke ili provizore deziras la pluan alsendon de EK — tiuj ĉiuj ne plu rajtas ricevi EK. Neniu rajtas ricevi senpage EK! — Povos okazi, ke al tiuj, kiuj tro longe atendas aboni, ni ne plu povos sendi antaŭan numeron elĉerpitan. Ekzemple de la Febr. n^o 125 de EK — pro la neantaŭvidebla nombro da novaj abonantoj — restas nur malmulte da ekzempleroj.

Se ni daŭrigos — propramove — sendi EK al ankoraŭ ne abonintoj, ni tion faros pro definitivaj motivoj. Se tamen tiuj,

kiuj ne pagis la abonmonon, estonte ne regule ricevos EK, tiam ili (ne havante rajton ricevi EK senpage) ne havas motivon por plendi; — ili ne havas motivon por diri, ke EK neregule eliras ĉar nur la abonintoj ricevas regule ĉiumonate EK; — se ili ne plu ricevos EK, ili ne havas motivon por diri, ke EK ne plu eliras kaj ĉesis ekzistadi, k.t.p.

* * *

Certe EK la lastajn jarojn travivis multe da malagrablajoj. La terura mondmilito malebligis ĝian eldonon. La konfuzoj post la milito haltigis ĝian normalan reeldonon. Fine en lando kun malalta valuto ni trovis samideanojn fervorajn, kiuj volis riski eldoni EK sub sia propra respondeco, tute sendepende de la Akcia Societo EK. Tiuj kuraĝaj samideanoj en Wien meritas la daŭron dankon de la katolikaj Esperantistoj. La reapero de EK en 1920 tuj revivigis la movadon inter katolikoj; kaj kiam okazis Nia Sesa, oni povis ĝoje konstati, ke ĉie la katolika Esperanto-movado vive rekreskis kaj promesis la plej riĉan rikolton. Malfeliĉe per Nia Sesa la katolika Esperanto-movado surprize estis sklavigita kiel alpendaĵo al tute aliaspeca organizaĵo, kaj la ideoj terure falsigitaj, la agado konfuzigita. La fatala postefiko de tiu katastrofo por la kat. Esp. movado respeguliĝis en la antaŭ Nia Sesa tiel bele reflorinta EK, kiu krome pro la tre kreskanta multekosteco ne povis porti tiom da malfeliĉoj. Pro la enŝuldiĝo de EK ĝi ne plu povis regule eliri; dum subteno de la flanko de IKa ne estis atendebla, ĉar la tuta malaperigo de EK estis unu el la celoj de la Metzgeranoj, post kiam montriĝis, ke tiu malnova organo rifuzis subiri la sklavecon de la organizaĵo IKUE, kies oficiala organo ĝi ĉiam estis.

La okazintaĵoj en Praha kaj en Graz fine plirapidigis la krizon de la Aŭstruja EK. La presisto en Wien rifuzis eldoni tuj post la Graz'aj konferencoj la promesitan kaj finance garantiitan „post-kongresan numeron de EK”, ĉar li antaŭe postulis samtempe la pagon de malnova ŝuldo. Tiel EK ne plu povis eliri en Wien. Nepoveco pro nevenkeblaj cirkonstancoj devigis S^{ron} Schröder. La eldono de la provizore kaj nenormale en Wien elirinta EK per tio finiĝis,

Feliĉe la granda ŝuldo de la Wien'a EK ĉe ĝia presisto nun

fine estas tute pagita, dank' precipe al la malavareco de S^{roj} Schendeler kaj Frans Smarius (Tilburg).

* * *

Jam en EK Junio 1921, p. 143 esti presita de la Akcia Societo jena deklaro:

„ĉar la postmilita konfuza stato de la mondo intertempe sufiĉe pliboniĝis, pro tio la gazeto „Espero Katolika” (kiu dum tiu ĉi jaro 1921 estas pruntedonita por memstara eldono en Aŭstrujo) post 1921 estos eldonata denove de la Akcia Societo mem, samamaniere kiel antaŭ la milito.”

Kaj tio okazis laŭlitere. Ĉirkaŭ 1922 por la unua fojo post la mondmilito EK **laŭ tute normala maniero** denove eliras, eldonata de la akcia Societo, tute konforme al ĝia deklaro en EK Junio 1921. **Regule ĉiumonate ĝi aperis ĝis nun, kaj aperos estonte.** Same kiel dum la tempo, kiam mi estis direktoro de la Akcia Societo kaj redaktoro de EK, t.e. en 1912, 1913 kaj 1914 ĝis la milito, — same EK, denun (1922) laŭ tute normala maniero eldonita de la sama direktoro kaj redaktoro, aperos **kiel estinte garantiite kaj regulamaniere.**

Mi apelacias al la abonintoj **antaŭmilitaj**, ĉu ili havis plendon pri ne regula apero de EK? Mi ne scias ke iam ekzistis serioza plendo. Tio do estas garantiaĵo, ke *ankaŭ post la milito* la Akcia Societo daŭrigos sian laŭkutime regulan edonon de EK.

Mi ne tiom emfaze pritraktus tiun aferon, se ne ekzistus signoj, ke niaj kontraŭuloj, kiuj nenion pli deziras ol ke EK definitive estus malaperonta, denove ŝajnas disvastigi la senmotivan klaĉon, ke EK baldaŭ malaperos, ke ĝi ne povos ekzisti, ke ĝi ne regule eliros, ktp. Tion almenaŭ oni raportis al mi.

Certe al tiu babilajo oni povas doni ian *ŝajnon* de seriozeco, memorigante la finan malsukceson de la Wien'a eldono de EK. Tiu eldono tamen — mi intence ripetas — estis nur provizora aranĝo, nenormala stato, EK tie eldoniĝis tute sendepende de la akcia societo (redakcie, administracie, finance). Certege estas, ke la **Akcia Societo EK** — kiu nun normalmaniere eldonas EK — **staras absolute ekster la katastrofo de la Wien'a EK.** Tiu balilajo do nur povas veni el malica fonto, kaj neniu serioza homo donos al ĝi eĉ plej malgrandan signifon kaj atenton. —

La ĝojo, de tiom da gravaj personoj esprimita pri la reapero de

EK en Nederlando, — la ĝisnunaj rezultatoj — la tiel alkuraĝigaj promesoj pri apogo kaj subteno: ne nur promesoj, sed tuja, senprokrasta helpo — la reviviĝo, fervoro kaj entuziasmo por „nia kara afero” en ĉiuj rangoj de la katolikaj Esperantistoj de post la reapero de EK — estas plua garantiaĵo por la daŭra sukceso de EK.

Kaj pripensu ni, ke la ekzistado de oficiala organo por la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) estas unu el la plej necesaj aferoj, Kion povus fari, kiel povus vivi granda organizaĵo, kies membroj estas disigitaj je granda distanco tra la tuta mondo, se ne ekzistus konstanta ligilo kaj informilo en la formo de oficiala propra gazeto? Tiu neceseco de ekzisto de tia gazeto estas plua garantiaĵo por la sukceso de „Espero Katolika”. —

Sed vi tamen ne povas nei — oni eble kontraŭdiros — ke ekzistas gravaj malfacilaĵoj? — Ho jes! sed ĉu ekzistis, ekzistas kaj ekzistos iam Esperanta gazeto, kiu ne havas tiajn malfacilaĵojn? Eĉ en la plej favoraj cirkonstancoj antaŭ la milito, tiuj malfacilaĵoj ekzistis ĉiam. Sed malfacilaĵoj nur ekzistas por esti venkataj: ili stimulas la fervoro, instigas al senripoza laboro, ekscitas al alstreĉo de fortoj, incitas al venko de la baroj.

Sed kiel vi finance sukcesos venki la malfacilaĵojn? oni eble daŭrigos demandi. Ankaŭ la eldono en lando altvaluta ne estas profitiga! — Ĉu eble en lando kun malalta valuto sukcesis eldoni daŭre EK? la spertoj donis la respondon! Certe tamen nia nuna EK ricevis eksterordinaran helpon per la apogo de la Eklezia Aŭtoritato. Ĉar ĉu ne la Reprezentanto de la katolika Hierarĥio en la Eparĥio, kiu estas la sidejo de la Akcia Societo kaj kie estas eldonata EK, estas doninta la plej varman rekomendon? Mi represas tie ĉi la tekston el EK n^o 124, p. 14 kaj mi petas, ke vi unumomente bonvolu doni tutan vian atenton al la sekvantaj, tre klaraj vortoj, de la Princo de la Eklezio: „*Volonte Ni donas nian aprobon, el la tiel plenmerita Monata Gazeto EK, kies reaperon Ni kore aplaŭdas... kaj tre ĝojigos al Ni, se la financa apogo de multaj helpos tiun ĉi utilan eldonojn por venki la nunajn malfacilaĵojn, kaj certigos ĝian tiel dezirindan floradon.*” Tiu ĉi elokventa eklezia rekomendo pri financa apogo sin turnas

ne nur al katolikaj Esperantistoj, sed al la katolikoj ĝenerale. Ĉar la Episkopo antaŭe plej serioze esploris la aferon, nur kontentigante sin je klaraj kaj certaj argumentoj; kaj Li plene konvinkiĝis, ke Espero Katolika estas „bona afero“, estas „katolika afero“ — bona katolika afero nepre subteninda de la Katolikoj. Subteninda le por venki la nunajn malfacilaĵojn: 2e por certigi la tiel dezirindan floradon de tiu utila eldono. Kaj efektive, kiam katolikoj legas la tekston, laŭsperte la monĵoj malfermiĝas: „mi scias nenion pri Esperanto; sed la eklezia aŭtoritato volas la apogon al via afero; tio por mi sufiĉas.“ — Kaj mi estas certa, se la EK-legantoj montros la tekston, tradukante ĝin en nacia lingvo, ke ĉiu vera katoliko bonhava aŭ donacema volonte finance apogos tiun, tiel klare eklezie rekomenditan, katolikan aferon, — Ĉiuokaze oni vidas, ke EK posedas fonton de enspezoj, kiun ĝi neniam posedis, kaj kiu neniam sekiĝos, ĝis kiam ne nur la nunaj malfacilaĵoj estos venkitaj, sed ĝis kiam la tiel dezirinda florado de EK estos certigita. Sed ĉu tie ĉi ne troviĝas grava garantiaĵo por la daŭra sukceso de EK?

Plie EK okupis ĉiam gravan lokon en Esperantujo. Ĝia fondinto estis aŭtoritato en Esperantujo. Pro Richardson estis amata de hebreo kaj protestanto, de Anglikano kaj Rus-ortodoksulo, de liberpensulo kaj ateisto; ĉe lia morto Esperantistoj ĉiureligiaj kaj de plej diversa vivofilosofio esprimis amon kaj respekton al tiu granda homo kaj Esperantisto: li, la principema katoliko, la sankta sacerdoto. EK kaj IKUE liveris al la Esperanto-movado gravan propagandan materialon (Papaj benoj, kongresoj, favoraj opinioj de katolikaj eminentuloj, ktp). Ĉiam EK donis ekzemplon de esperantismo, de fideleco al la Fundamento, de decidema defendo de „nia kara afero“. En la historio de Esperantujo EK kaj ĝiaj gvidantoj okupis gravan kaj honoran lokon. Ĉu tia gazeto, kies meritoj estas rekonitaj de la tuta Esperantistaro, ne posedas en si mem garantiaĵon por sia daŭra sukceso?

Fine oni unumomente legu atente la titolan paĝon (kovrilon) de EK. Ĉio, kio tie troviĝas presita, estas rekonita de eklezia aŭtoritato aŭ de ŝtata aŭtoritato. Troviĝas tie nenia trograndigo fanfaronado aŭ malrajto. Troviĝas tie nur la koncentrigita vero pri nia EK, kvazaŭ kompendio de nia glora historio. Kiel ĉe meritplena homo, kies bruston ornamas honorigaj ordenoj — tiel

ĉe nia EK ankaŭ honoraj dekoracioj vidigas ĝiajn longjarajn meritojn. Kiu vera Esperantisto katolika ne fierus kiel Katoliko kaj kiel Esperantisto pri sia plenmerita gazeto kun ĝia longjara glorplena historio?

Resume: la Akcia Societo, kiu ĉiam — tiel antaŭ, kiel post la milito — plenumis siajn promesojn rilate al siaj abonantoj — la ĝojo je kiu ĉie la reapero de EK en Nederlando estas salutita — la neceseco de propra organo por vasta organizaĵo kiel IKUE — firma volo kaj taŭga rimedo por venki la nunajn malfacilaĵojn kaj certigi la tiel dezirindan floradon de EK — la grandaj meritoj de EK por nia kara afero kaj la grava rolo kiun ĝi okupis en Esperantujo — ĝia glora kaj honora historio: tio ĉio garantias la nepran sukceson de nia Espero Katolika, ankaŭ por la estonto.

* * *

Mi povas subite morti, neatendite povas pereji la mondo, aŭ aliaj katastrofoj neantaŭvideblaj povus eble malhelpi. Cetere el supre diritaj konsekvence nur sekvas kun severa logiko kaj decida konvinkiĝo la deklaro: **MI GARANTIAS LA DAŬRAN, REGULE ĈIUMONATAN ELDONON DE ESPERO KATOLIKA: mi garantias tion kun tuta mia persono, kun mia honorparolo, kun mia reputacio de honesta homo.** La amplekso de ĉiu kajero estos 24 ĝis 32 paĝojn (krom kovrilo); se ni de tempo al tempo donos pli da paĝoj, tiuj ĉi estas konsiderablaj kiel donaco de la eldonantoj al la abonantoj. —

EK reeliris en la plej mallumaj cirkonstancoj. Ĝi devis elŝiri nian karan movadon el la 'sklaveco kaj perforte almiliti la plenan liberecon. La terura fulmotondro nun pasis, kvankam le ventego ne ankaraŭ tute kvietiĝis kaj de tempo al tempo tondro memorigas al la pasinta uragano. Pacienĉu! baldaŭ la vetero plene klariĝos kaj fine la suno ĉion denove orumigos.

Kaj ni daŭrigos, trankvile iri nian vojon. Konsciaj, ke ni estas pigmeoj sur la katolika kampo, kaj admirante tie la gigantulojn, kiuj laŭ indiko kaj gvido de Papo kaj Episkopoj preparas la internacian katolikan agadon. Ho! ni posedas por tiu internacia katolika agado tiel taŭgan, mirindan ilon! Sed kion ni faros? Ĉu kun niaj malgrandaj manetoj ni forprenos al la gigantuloj kaj pioniroj de la katolika agado la bridojn, je kiuj ili direktas la

amason? Ne ridindigu nin! Ni nur okupu nin je nia propra, speciala tasko: *la internacia katolika agado Esperantista*. Tiu lasta vorto ne devas esti forigata; ĝi indikas la specifan, la karakterizan devon de ni plenumotan. Unualoké ni pligrandigu nian movadon, propagandante Esperanton inter Katolikoj kaj varbante ilin; dualoke ni internacie kunlaboru *per Esperanto*, sur nia propra teritorio servante la interesojn de la Katolikismo. Sur tiu teritorio *ni* estas la gvidantoj, la agantoj, la laborantoj por la katolika afero. Kaj ju pli ni pligrandigos nian teritorion, kaj ju pli ni sur ĝi faras laboron internacian, des pli ni montras al la katolika mondo, kiom utila kaj necesa estas la enkonduko de Esperanto en la internacia vivo, kiom tiu ĉi lasta per tio estos plisimpligata kaj plifaciligata.

Al tiu tasko, kiel estinte, nia Espero Katolika laboros ankaŭ estonte. Ne deflankiĝante ni iru nian vojon. Apartenante al la ĝenerala Esperanto-movado, ni estas nur la katolika branĉo de tiu movado. Celante la samon: la enkondukon de Esperanto en la internacia vivo, ni tamen laboras precipe inter Katolikoj, agas nepre laŭ katolikaj principoj kaj por la katolika afero. Antaŭen do, karaj kunlaborantoj, antaŭen „ad majorem Dei gloriam“.

D^{ro} Smulders.



Jarcentoj forpasis — forpasis feder',
 Foriris herezoj — sed restis la ver'.
 Senŝanĝe, senĉese — la sankta Eklezi'.
 Progresis surteren — en nomo de Di'.
 La mondo skuiĝas — sen lumo, sen cel',
 Nur tronon de Petro — lumigas ĉiel'.
 Revenu al Dio — al ŝtono kun pent',
 Jam vokas vin Pio — revenu ĉiu gent'.
 Ribeloj, detruoj — diskuros la ter',
 Nur savos popolojn — la Patro de l' ver'.

P^{ro} J. Bianchini.

Katolika Esperanto-movado.

En Wien okazis la 1an de Februaro 1922a la fondiĝo de la esperantista grupo: „Esperantista laboristaro kristana de Aŭstrujo”. S^{ro} A. Huber ĉeestis kiel delgito de „Katolika unuiĝo esperantista en Wien” kaj alportis la bondezirojn de supre nomita societo. La estaro de la novfondiĝinta societo decidis, ke „Espero Katolika” estu oficiala organo. La celo de la societo estas: Esperanton inter la Kristana laboristaro de Aŭstrujo enkonduki, disvastigi kaj akceli, plue kunlabori por la kreo de vera internacieco kaj internaciaj legoj socialaj por la ŝirmado kaj prizorgo por la laboristaro. La fondiĝo estas frukto de Esperantokurso aranĝita de la unuiĝo: „Societo de kristanaj laboristoj kaj labristinoj „Aŭstrujo”. La adreso estas: Wien, XVII, Weidmanngasse 32.

Francisko Bischof.

Ĉu „Moka” estas kontraŭ IKUE?

Plenrespektante la valoregan artikolon de D^{ro} Hotzelt, mi, kiel komitatano de Moka, estas devigita iomete korekti lian diraĵon en E. K. n^o 125: „D^{ro} Metzger organizis kontraŭ-**IKUE**-anan junulan movadon, la tiel nomitan „Moka”.

Ne, D^{ro} Hotzelt, tio ne estas tute ĝusta!

Laŭ mia korespondado kun diverslandaj unianoj, Moka ne estas kontraŭ IKUE, ĉar la Mokanoj, almenaŭ la plejmulto el ili, nur vologas servi la bonajn katolikajn idealojn kaj malamas ĉiun fanfaronadon, ĉiun trograndigon, ĉiun malveron. Ĉu el Graz, ĉu el ia alia centro.

La renaskinta IKUE-movado estas por ili ĝojega fakto kaj se ĝia agado restos pura, nemakulita, certe la Mokanoj subtenos ĝin. Ni ne servas S^{ron} Sappl nek D^{ron} Metzger; eĉ komencas jam saĝi, ke ni baldaŭ malservados tiujn gvidantojn. Ĉu tio estas strange?

Certe ne! Ankaŭ en aliaj landoj ol Nederlando la delegitoj komencas ekkoni, ke ili estas trompitaj per fanfaronadoj el Graz. Ĉu estas strange ke ili ne plu fidas la centron?

En Aprilo 1921 S^{ro} Sappl jam skribis, ke Moka nombris 100 Delegitojn. Mi demandis adresliston, sed nia sekretario ne havis la tempon por plenumi mian deziron. Mi demandis denove, sed S^{ro} Sappl. prokrastis ĝis hodiaŭ, Jen la fakto, ke Komitatano de Moka ne ricevis la adresojn de la Delegitoj.

Ĉu estas strange, ke mi komencis pensi: Ĉu S^{ro} Sappl konas la adresojn li mem?

Kaj mendinte akcion de la Paulus-eldonejo kaj sendinte la monon kaj... neniam ricevinte la akcion — ĉu estas strange, ke mi malfidas la centron, ĉu ne?

Sufiĉe, mi ne daŭrigos mian plendoliston; la temo estas tro malĝoja.

Se mi ne deklaris la militon post la altrudo el Graz, tio estas, ĉar mi ankoraŭ esperas, ke nia laboro kaj precipe ankaŭ la laboro de nia gvidanto ne perdiĝu. Sed mi deziras la verecon, kaj nur la verecon, kaj mi estas konvinkita, ke mi parolas je la sentoj de preskaŭ ĉiuj Mokanoj — kaj tial ne diru, D^{ro} Hotzelt, ke ni estas kontraŭ IKUE; tute ne, ni estos viaj amikoj kaj kunbatalantoj. —

Kara Redaktoro de EK, vi certe pensos, kial mi ne sendis ĉi tiun artikolon al „Katolika Mondo”.

Pardonu, mi kredas, ke la libera tribuno ne estas malferma por la plendoj, sed plej taŭgas por fanfaronado. Ĉar S^{ro} Sappl skribis al mi 8 Feb. 1922, ke la konflikto inter IKUE de Richardson kaj Graz nun estas pace solvita, dume EK Feb. 1922 rakontas tute alie, mi ne fidus, ke la sin subskribanta Profesoro respektos la rajtojn de lia komitataneto, kaj mi timas, ke li perdigu mian skribaĵon.

S^{ro} Sappl pardonu, se mi uzas akran tranĉilon; la kuracistoj praktikas: ubi pus evacua, ĉion puson forfluigu, kaj la vundo pugas sufiĉe; mi tamen volonte kunhelpas la sanigon.

H. N. Kemme, stud. med.
Komitatano de Moka.

Amsterdam, Febr. 1922.

Noto de la Redakcio de EK. — Ni volonte donas lokon al supra artikolo, ĉar ĝi estas kvazaŭ kompletigo de la artikolo, de D^{ro} Hotzelt en EK 125. Plue en aldonita letero S^{ro} Kemme skribas, ke li per supra artikolo nur celas la pacon kaj ne la militon. —

Lastmomente, ĵus antaŭ la eliro de *tiu ĉi* numero ni ricevis „Klarigon“ de la estraro de „Moka“. Ĝi aperos en la proksima [Aprila] numero.

K. M. 6.

La cirkonstancoj devigas nin, tute aliigi la jam antaŭe preparitan enhavon de tiu ĉi numero: artikolo pri la „katolika studenta internacio „*Pax Romana*” kaj traduko de bela parolado pri tiu afero; — la parolado de la Prezidanto de la „Konstanta Tribunalo por Internacia Justeco”, Mr. Loder, okaze de la solena malfermo de tiu gravega tutmonda institucio; — kaj aliaj artikoloj de niaj kunlaborantoj. Pli urĝaj aferoj postulas priparolon.

* * *

En EK 124, p. 57 mi postulis **refuton** de mia tezo: *ke la IKa de D^{ro} Metzger estas diversflanke riproĉinda kaj nefidinda kaj ke ĝi trompis la mondon.* Por pruvi tiun tezon mi alportis amason da faktoj kaj okazintaĵoj, per kiuj mia tezo ĉiuflanke estis pruvita. Eĉ se en la amaso da argumentoj unu aŭ du eble estus ne tute ĝuste redonitaj, restas tiom da nerefuteblaj argumentoj, ke *mia tezo entute* restas absolute pruvita. „Al prunujo tiel plensarĝita oni ne rimarkas, se mankas kvin aŭ ses prunoj”, diras nederlanda proverbo. Mi, konante la Metzgeranoj, postulis veran refuton, kaj skribis p. 57:

„Refuton mi postulas, ĉar simpla neo aŭ senenhavaj asertoj kaj ridindaj babilajoj, kiuj tute ignoras miajn argumentojn, kompreneble havas nenian valoron.... sed tiuj ignoro, neo, asertoj, babilajoj rilate al miaj argumentoj (anstaŭ efektiva kaj serioza refuto) nur estos plua argumento por la vereco de mia kulpigo”.

Tiun lastan pluan argumenton liveras KM 6. La artikolo de S^{ro} Mayr en KM 6 estas karakterize Metzgerana: asertoj! Mi volas konsenti ke „por refuti detale la tutan enhavon, oni devus „skribi libregon”. Sed se S^{ro} Mayr almenaŭ estus uzinta la lokon, kiun okupas nun lia artikolo en KM 6, por efektive *refuti*, anstaŭ per *supraĵaj asertoj* plenigi ĝin, tiam li almenaŭ estus doninta pruvon de seriozeco. Ankaŭ lia stranga „konvinkiĝo”: „ke ĉiu publika diskutado estas malutila al la katolika afero” estas tipe Metzgerana tezo.

‘Mi tamen kuraĝas fari la krimon, havi malsaman opinion kiel tia grava kaj alta persono en la Katolika Mondo, kia estas S^{ro} Mayr.

Do! oni libere povus disvastigi en la publiko: publike presitajn ideojn malkorektajn pri la katolika afero; kaj.... estus „malutilo por la katolika afero” sammaniere, do publike, klarigi kaj korekti la malkorektaĵojn? Ne! gesinjoroj: *en tiu ĉi okazo* la malutilo povas esti forigata nur per publika pritraktado, per publika diskutado, el kiuj nur povas rezulti utilan efikon por la katolika afero. —

Krom la artikoleto de S^{ro} Mayr, KM 6 enhavas ankoraŭ arti-

kolon kun la opinio de S^{ro} Ritter von Lama (vidu p. 149 - 150). Supozu ni unumomente, ke estus estinta **mi**, kiu por la unua fojo estus asertinta en EK 124, ke IKa enhavas „danĝeron de kontraŭ-eklezio”. Kiom oni tiam estus krieginta pri „kalumnio”, „ofendo” ktp! Certe mi jam longtempe havis la saman ideon, sed mi trovis ĝin tiel kompromitanta por IKa, ke mi efektive ne kuraĝis elparoli ĝin. Nun faras tion S^{ro} R. von Lama — kaj la plej granda kuriozaĵo nun estas, ke la Metzgeranoj proponas tiun opinionon de S^{ro} von Lama, kvazaŭ mi per ĝi tute estus refutita! Sed ĉu la legantoj de KM ĉiuj estas perdintaj la sanan prudenton, se ili ne komprenas ke la opinio de S^{ro} von Lama, estas kvazaŭ aŭtentika konfirmo de nia EK n^o 124?

Ĉi sube mi *intence* detale pritraktas nur esencajn, principajn, ĉefajn aferojn, pri kiuj ne devas daŭre ekzistadi malkompreno kaj konfuzo. Mi, kiel ĉiam, nur intencas servi la *publikan bonon*, la *publikan katolikan aferon*. Mi en EK 124, p. 3 klare montris kaj per komparo komprenigis (Franca imperio de Napoleono), pro kio ne estis eble priparoli tiun ĉi publikan aferon, ne okupante min ankaŭ pri *personoj*. (1)

La Opinio de Friedr. Ritter von Lama pri IKa.

En EK. n^o 124, p. 76 mi skribis:

„En la supre menciita artikolo de „*Bayerischer Kurier*“, n^o 469, kiu estas tiel afabla kaj amika al IKa, ni por la unua fojo *kun certeco* sciiĝas, ke

(1) Flankaĵoj pritraktitaj de S^{ro} Mayr estas ekz. 1. lia fantaziaĵo pri ekzisto de broŝuro de mia mano, en kiu mi „*aprobas ĉion, kion mi nun malaprobas*”; tia broŝuro ne ekzistas! 2. Pri tio, kion S^{ro} Mayr asertas pri nia Akcia Societo, li trovas plenan refuton en EK 124. 3. S^{ro} Mayr volas kredebliĝi la nekredblaĵon, ke la teksto en „*Esperanto Triumfonta*” de 2 Okt. 1921 ne devenas el la Centra Oficejo de IKa. Ĉar la oficiala raporto de la konferencoj tiam ankoraŭ nenie estis publikigita, kaj ĉar la redaktoro de E. T ricevis *tian* detalan oficialan raporton, ke mankis al li loko kaj ke li nur presigas la longan oficialan *laŭliteran* tekston de la resolucio akceptita en la lasta kunsido (ampleksantan pli ol unu tutan paĝon de EK) — pro tio S^{ro} Mayr volas kredebliĝi nekredblaĵon. Mi do ne kredas lian nepruvitan aserton, ĉar ĉio pledas kontraŭ ĝia vereco. — 4. Komencis persone ataki S^{ro} Metzger, senmotive kalumnianta la bonan reputacion de S^{ro} Schröder. — Mia letero en EK Junio 1921 (elirinta je la fino de Julio) nur enhavas ĝeneralajn seriozajn argumentojn, kaj neniun personan atakon al D^{ro} Metzger, kiel asertas nevere S^{ro} Mayr en KM 6. Vidu la tekston de mia letero en EK 124, p. 70 kaj 71; mi apelacias al ĉiu sincera leganto, ĉu li povas trovi en ĝi la plej malgrandan *personan* atakon!

la IKa-konferencoj ne havas la aprobon de la Sankta Seĝo.

La verkisto citas el *Münchener Katolische Kirchenzeitung* de 9 Oktobro 1921 (elirinta do jam unu monaton post la konferencoj en Graz), en kiu la „bone sin orientinta“ Friedr. Ritter von Lama skribis i.a., ke la en si mem bone intencitaj klopodoj, kiuj koncentriĝis en la Graza kongreso, ne trovis la aprobon de plej alta loko kaj ke ekz. la prezidanto de la Itala Popola Unuiĝo, Grafo Pietromarchi, kiu ja estas elektita de la Papo mem, en la „*Osservatore Romano*,“ emfaze malkonfesis ĉiun rilaton kun tiuj ĉi konferencoj.

La „*Bayr. Kurier*“ daŭrigas: „antaŭ ĉio oni devas sin teni al tiu ĉi vidpunkto de la Vatikano.“ — Plue ĝi diras: „La klopodoj, kiel ili estis koncentrigitaj en la Graz'a kongreso, skribas Ritter von Lama, ne trovas la aprobon de la plej alta loko“. — Kaj ĝi finas:

„*Kiom ajn oni sin ĝojas en la Vatikano pri la fervoro kaj la „gravaj planoj de la en Graz kunvenintaj homoj, oni tamen tie „evidente post plene objektiva, plej matura pripensado venis al la „konvinkiĝo, ke al la entrepreno ankoraŭ mankas la necesaj fortikaj fundamentoj. Kiam la Sankta Seĝo pro diversaj kaj „bone pripensitaj kialoj ne aprobas la Grazajn Konferencojn t.e. ĝin ne povas ŝirmi je sia aŭtoritato, tiam „per tio al la gvidantoj de la movado, kiu eleris el Graz, nur „estas donita la patra admono, multe pli singardeme pliesplori „la gigantan problemon, kaj kun ĉiu ebla prudenteco kontentigi „sin kun tio, kio estas efektive atingebla sur nepre certa „fundamento.“*

Jam sur p. 50—51 (EK 124) mi citis ĉion plej fidele, kio estis publikigita de IKa pri la papa aprobo, kaj ne trovis certajn signojn, pri efektiva, plena aprobo. Tamen IKa per trograndigo ktp. ĉe ĉiuj vekis la impreson, kvazaŭ la IKa-mem trovis plenan aprobon, eĉ oni maluzis la papan benon por Nia Sesa, kiu nur kaj ekskluzive estis donita al la malnova IKUE de Richardson en sia de post 1910 ekzistanta formo (vidu EK 124, p. 48.)

IKa do montriĝis nefidinda kaj trompis la mondon per tio, ke ĝi ŝajnis, kvazaŭ ĝi posedis pli da aprobo ol ĝi ricevis. Tion ni klare montris. Kaj ne povas esti dubo pri nia tezo, kiun mi volis pruvi: la surkribo de la artikolaro estas: „Riproĉinda kaj nefidinda“ kaj la „konkludoj“ el tiu artikolaro estis: „Ŝajnas al mi, ke mi sufiĉe provis, ke la IKa de D^{ro} Metzger estas diversflanke **riproĉinda kaj nefidinda**; jen tio, kion mi promesis pruvi (p. 55). „Mi tie ĉi publike kaj laŭte elkrias la kulpigon: **la IKa de D^{ro} Metzger trompis la tutan mondon** (p. 56).

Nenie oni povas legi en la 100 paĝa EK 124, ke mi konkludis,

ke „la Sankta Seĝo rekte *malaprobis*.“ Mia tezo pruvita estis nur la *nefidindeco* de la IKa, ĉar ĝi *trograndigis* esencajn aferojn de IKa, per tio trompis la publikon, i.a. pri la karaktero de la Papa aprobo.

* * *

En KM 6 troviĝas ankaŭ citato de artikolo el „*Bayerischer Kurier*“ de la mano de S^{ro} Ritter von Lama. Tiu tuta artikolo povus esti presata en EK 124, por treege fortiki miajn argumentojn. Tamen — mi ne scias ĉu estas la trompa manio de IKa, ĉu estas naiveco kaj „sancta simplicitas“ — IKa ŝajnigas, kvazaŭ per tiu artikolo mia supra citato estas tute refutita! Mi supozas, ke estas la „sancta simplicitas“. La artikolo de S^{ro} von Lama lumigas mian EK 124 je hela lumo. Estas do unu enigmo pli en IKa, ke ĝi triumfante presigas artikolon tiom maltriumfigante ĝin. Se la *ŝajno* ĉe ĝiaj legantoj nur estu savita, IKa jam kontentigas sin. Sed estas la kontentiĝo de kamparano, kiu ridas havante fortan dentdoloron.

Jen do, kiel IKa refutas(?) mian tezon (mi represas la tutan artikolon el K.M. 6):

„IKa kaj la aprobo de la plej alta eklezia aŭtoritato.

Plej ofte kontraŭuloj de IKa-movado uzas la riproĉon, ke IKa ne havas la „aprobon“ de la eklezia aŭtoritato precipe de la apostola Seĝo en Romo. Tre ruze ili uzas ĉi tiun riproĉon, tre sciante, ke per ĉi tiu ilo plej facile ili povas semi konfuzon inter la fidelaj IKa-anoj. Tial ŝajnas al mi plej necese, mallonge klarigi la ofte uzatan vorton „aprobo“, kiu estas uzata en diversaj sencoj. Sed mi ne volas mem skribi pri tio. Mi citas aŭtoritaton, cititan eĉ de S^{ro} Smulders, nome S^{ron} Ritter von Lama, kiu laŭ S^{ro} S. estas „bone sin informinta persono“. Ritter von Lama skribas en „*Bayrischer Kurier*“, München, de 9^a de novembro 1921 sub la titolo „La internacio katolika kaj la Graz’aj klopodoj“ i.a. ¹⁾.

„Antaŭ ĉio mi volas konstati, ke, kion mi . . . skribas pri ekleziaj aferoj, estas pure privataj opinioj de mi, por kiuj mi sole prenas sur min la respondecon . . . Mi devas energie kontraŭdiri la opinion, ke el miaj artikoloj parolu la ‚Vatikano‘. Mi pli frue, estante en Romo, plej akre kontraŭbatalis la penad-

¹⁾ Bedaŭrinde S^{ro} Smulders ĉi tiun artikolon, kiu volas korekti la de S^{ro} S. cititan artikolon, ne mencias en E.K.

Nota de la redakcio de E. K. — KM vidas, ne mi volonte plenumas ĝian deziron, kaj mi dankas ĝin por havigi al mi la tekston. Kompreneble mi ne estas abonanto de ĉiuj ĵurnalaj de la mondo, do mi scias nenion, se oni ne alsendas artikolon el alia lando al mi. Mi sciigis unuafoje pri supra artikolo per la afabla KM.

ojn de malgranda rondo. kiu sub Pio X^a malprave sin ĉirkaŭigis kun pli alta aŭtoritato kaj arogante sin faris tutmondan cenzuran-tulon de la katolikaj klopodoj . . .

Estas vaste divastigata eraro opinii, ke ĉio, kion la Sankta Apostola Seĝo ne aprobas esprime, estu malaprobata de ĝi. Oni enkuraĝas kaj subtenas en Romo ĉiun bonan aferon, oni ĝin observas, oni serĉas atingi, ke ĝi ne marŝu danĝerajn vojojn kaj interdume oni trankvile atendas, kiamaniere ĝi evoluigas kaj kiel sin provas la ĝin gvidantoj. Oni pripensu nur ekz. la fondojn de novaj kongregacioj: kiom da reguloj devas esti plenumitaj, kiom da jaroj pasas, ĝis kiam eĉ nur provizora aprobo estos donata! Eĉ Don Bosco, ĉi tiu modelo de l' pacienco, diras iam, ke li estus preterlasinta la fondon de sia societo, se li antaŭe estus sciinta la malfacilaĵojn, kiujn Romo faras antaŭ la aprobo de nova kongregacio. Kion Romo fakte aprobas, tion ĝi protektas kun tuta sia aŭtoritato... Do, se la apostola seĝo al iu nova entrepreno ne donas la ,aprobon' t. e., se ĝi ne tuj donas la oficialan aprobon, tio tute ne estas juĝo pri la entrepreno mem. La samo valoras pri ,Internacia Katolika'. La ideo de la alproksimiĝo kaj repaciĝo de la popoloj kompreneble trovas la tutan aprobon de Benedikto XV^a ; la klopodoj por iliaj realigoj tial estas salutataj de li. Sed oni atendu, kiamaniere sin realigos la bona volo de la iniciantoj.

Ke kelkaj danĝeroj ekzistas kaj devas esti forigitaĵ, havas sian kialon en la speco de la entrepreno mem. La ,Internacio Katolika' alceladas la kreon de internacia sinkompreniĝa organizo, kies trabaĵo estas la reprezentantoj en la apartaj landoj; ili estas subordigitaj al unu centra oficejo. Do tie temas pri projekto de iuspeca laika hierarĥio, kun propra estraro, kiu, se ĝi mem ne ĉiam memoras sian rilaton al la eklezio, povus aperi iutempe kiel iu speco de kontraŭeklezio. Mi tutcerte kredas al ĉiuj nuntempaj partoprenantoj, ke ili kun indigno rifuzas tiuspecan intencon kaj mi tute ne volas, ke oni konkludu el miaj vortoj, ke mi dubas pri ilia bona intenco. Tute ne. Sed ili volas krei ion, kio ankoraŭ ne ekzistas kaj tie estas nature kaj kompreneble, ke oni sin retenas en Romo antaŭ ol ke oni mem positive kunagadas kaj per oficiala aprobo donas la ateston de eklezia sinproviĝo. La itala ,Unione popolare' rekte estas subordigita al la Sankta Seĝo, ĝi estas rekonita oficiale kaj aprobata, kio al ĝi kaŭzas devojn i. a. ankaŭ tiucelajn, ke ne fariĝu malkorekta opinio pri la pozicio de la Sankta Seĝo. Pro tio ĝia deklaro en ,Oss. Rom.' estis necesa. Sed ĝi ne diras pli ol ĝi diras."

Rimarko. Ni opinias, ke per la bonegaj klarigoj de la famkonata Vatikana raportisto plej bone la demando estas solvita. Cetere ni ĉiam estas dankemegaj por ĉiuspeca kritiko, ĉar ni plej

bone scias la gravan respondecon sin ŝarĝantan nur niaj ŝultroj. Ni nur urĝe petas, ke oni ne trapasu la limojn de la frato amo, ankaŭ se oni kritikis plej akre. Pri la danĝeroj cititaj en la supre skribita artikolo ni parolos en unu el la sekvontaj numeroj de K. M. K. M.

Oni vidas, ke R. v. Lama ripetas la samajn ideojn, kiujn mi jam citis el *Bayer. Kur.* en EK 124, p. 76 (vidu p. 148). Estas do tre naive de KM., ŝajniĝi per supra artikolo, kvazaŭ per ĝi la EK citato estus refutita!

Jen do per KM klare montrite, jen do nova pruvo por mia tezo, ke IKa ne havas la oficialan aprobon de la Sankta Ŝeĝo. Ke do la multaj, kiuj kredis tion, pro la asertoj de la Metzgeranoj, estis trompitaĵoj. —

Nun mi denove donas citatojn: „Kaj estu, ke la Papo laŭdis la celon de IKa kaj pluajn senkulpajn IKa-aferojn” (p. 56). La celo de IKa kaj la programo estas kompreneble laŭdindaj; kiu katoliko ne aprobus ilin? Jes, ni katolikaj Esperantistoj kompreneble aplaŭdas celon kaj programon de IKa” (p. 75). „Ĝojo pro la belaj perspektivoj, kiujn povas montri al ni la IKa-movado.” (p. 83). „Ĉu ... mi ankoraŭ devas certigi, ke mi tute ne kontraŭstaras la celon de la Graz'a Internacio Katolika? Certe ne.” (p. 83).

Ĉu ne estas, kvazaŭ tie ĉi parolas la plej fanatikaj IKa-uloj? Tamen tiuj citatoj estas vortoj de D^{ro} Smulders kaj de S^{ro} Schendeler en EK. n^o 124!

Pro kio ni tamen skribis n^o 124 kaj estas kontraŭuloj de „la IKa de D^{ro} Metzger”? Jen la respondo: „Sufiĉas nur severa esploro de la IKa en la praktiko, por kondamniĝi ĝin tiuĉirilate de ĉiu honesta homo” (EK 124, p. 56).

Tio sufiĉu por montri, ke ni IKUE-anoj ne malaprobas la celon kaj programon de IKa, sed jes la IKa de D^{ro} Metzger en la praktiko. En tio ni tute konsentas kun S^{ro} R. von Lama. Sed se tiu ĉi lernis Esperanton kaj povus legi EK 124, tiam li ne plu parolus pri danĝeroj ekzistantaj, ke IKa povus aperi iutempe kiel speco de kontraŭ-eklezio; sed ke ĝi en la praktiko jam kondukis kiel tia.

Jam ĉe la starigo, antaŭ ia interrilato kun Papo kaj Episkopoj, IKa sin turnis per „enciklika” Manifesto al la tuta Katolikaro, ke ĝi estas LA Internacio Katolika, al kiuj ĉiuj katolikoj kaj katolika organizaĵoj havas devon aliĝi. Aliajn internaciajn klopodojn (per Papo kaj Episkopoj apogitajn), kiuj ne tiuj obeis al IKa (i. a. la „klopodo” de Prof. Steger, vidu artikolon EK 125 p. 100-104) IKa akre kontraŭbatalis aŭ ridindigis (vidu EK 124). Kaj certe la katolikajn *Esperantistojn* oni nepre volis devigi aparteni al IKa. Vidu la starigon de la Graz'a „IKUE”, kaj la klopodoj por per-

forte sufoki la liberan sendependan IKUE de P^{ro} Richardson. Ŝajnis krimo, se oni kuraĝus liberiĝi de IKa, de la kontraŭeklezio; kiam oni klopodis tion, tiam oni nomis tion „akraj atakoj, kalumnioj” ktp. Libereco ne plu ekzistis kaj estis perforte sufokita.

Kun kia rajto kaj aŭtoritato IKa agadis kiel la deviga unuiĝo de la tuta Katolikaro? Je kiu rajto ĝi nomis sian unuan kongreson: „Universala Kongreso de la tutmonda katolikaro”? Ĉu tiu nomo sole estas blufa? Ne sole! en tiu nomo oni retrovas la karakteron, la tendencon de IKa. Al IKa apartenas kaj devas aparteni ĉiuj katolikoj senapelacie, kaj ve tiuj, kiuj ne tuj obeis en humila submetiĝo!

La Hierarĥia Aprobo.

En KM 6 S^{ro} Mayr, kiu ŝajnas funkcii kiel „enfant terrible” de IKa, rakontas al ni kiel „refuto” al EK 124, ke IKa „ricevis de „lia Kardinala Moŝto de Vieno la leteran sciigon, ke la aŭstria „episkopa konferenco (= episkoparo) nenion decidis pri IKa „aŭ ties kongreso.” Do fine IKa mem konfesas tie ĉi, ke ĝi ne havas la aprobon, ke ĝia kongreso ne havas la legitimadon de la Episkoparo de la lando de la centra oficejo de IKa kaj de la Konferencoj. Nu, tion ni sufiĉe kaj detale jam pruvis en n^o 124. Vidu nur mian oficialan leteron al mia Episkopo (n^o 124, p. 10); „Kiom mi scias, nenio estas aprobita de la rilataj Episkopoj, nek „la starigo, nek la centra oficejo, nek la statutoj, nek ĝia organo, „nek ĝia „kongreso“ en Aŭg. 1921, kiu laŭ la Aŭstruja „Reichspost” „posedis nek la „apogon” (6. VII) nek „la legitimadon” de la „Episkopoj (23, VIII).”

Ankaŭ ne en la lando de sia sidejo (Hago, Nederlando) IKa havas la aprobon de la Episkoparo. Ne nur ne la aprobon, sed eĉ la formalan malaprobon. Oni legu la paroladon de S^{ro} Pastoor en EK 125, p. 122-126.

Kaj jen rimarkinda afero. Dum oni kutimas ĵongli en IKa kun Kardinaloj kaj Episkopoj ktp. — la tute klara sintenado de la Nederlanda Episkoparo de ili estas pritraktata kiel bagatelo, kiel neatentindaĵo!

Tamen Mons^{ro} Diepen estas nia Samideano, li estas depost 1909 membro de „Nederlanda Katolika”, paginte sian kotizaĵon ĉiujare, estis dufoje Honormembro de la IKUE-kongresoj en 1911 kaj en 1920 (kie IKa stariĝis), li serioze pristudis la tutan aferon, — kaj okaze de la ĝenerala kunveno de „Nederlanda Katolika”, 6 Jan. 1922, Li, intence demandite de katolika organizaĵo N. K. pri ĝiaj devoj rilate al IKa kaj IKUE de R., en sia kvalito de katolika Episkopo respondis.

En la parolado de S^{ro} Pastoor oni legas, ke Mons^{ro} Diepen de-

nove deklaris, ke la Episkoparo de Nederlando malpermesas propagandon por IKa en Nederlando, ke aliĝo de NK al IKa estas formale malpermesita, kaj ke la IKUE de Richardson per la Hagaj decidoj 1920 tute ne ĉesis, sed estas daŭrigita kun la sama karaktero, la sama regularo, ktp.

Estas do nerefuteble pruvita, ke IKa ne posedas la aprobon de la Episkopoj, kiuj eklezie rekte rilatas al ĝi kaj sub kiuj IKa hierarĥie apartenas (sidejo, centra oficejo, konferencoj).

Tio estas tre grava — precipe ĉar IKa sen hierarĥia aprobo daŭrigas gvidi la katolikojn sur katolika kampo por katolika agado. Sed kiuj rajtas, eĉ devas gvidi la Katolikojn en katolikaj aferoj? La Episkopoj en siaj Eparĥioj, la Episkoparo en sia Eklezia Provinco.

S^{ro} Ritter von Lama prave parolas pri „danĝero” de „kontraŭeklezio”!

Ĉar Metzger k.s. ne nur oficas kiel la gvidantoj de katolikoj en katolikaj aferoj, sed eĉ, se oni ne tuj estu obeema kaj submetita al ili, kondamnas. Per la arbitra kreado de „IKUE” de Graz, ili intencis devigi ĉiujn katolikajn Esperantistojn aparteni al IKa. Ve, la katolikoj, kiuj ne tuj humile submetis sin: ĉu ne en Praha oni forprenis ĉiun liberecon al la kat. Esperanto-propagandistoj Richardsonaj kaj perforte tie sufokis ilian agadon? (EK 124)

Se la Metzgeranoj estus sukcesintaj subjugi en sklaveco la liber-naskitan IKUE de Richardson, tiam ekzemple la kat. Esp. en Nederlando estus devigitaj, aŭ malobei al la Metzgeranoj kaj obei al la Episkopa Aŭtoritato kaj izoliĝi (kio signifus pereco de la kat. Esp. movado en Nederlando); aŭ, se ili dezirus internacian kontakton, aliĝi al la „IKUE” de Graz, kaj do obei al la Metzgeranoj kaj malobei al la Ekleziaj Aŭtoritatoj. S^{ro} R. von Lama tute prave parolas pri „danĝero” teorie, dum *en la praktiko jam ekzistis pli ol „danĝero”*. — Sed feliĉe la seninterrompe daŭrigata *libera* IKUE de Richardson vivas, floras kaj kreskas! (1)

* * *

[1] Kiel kuriozaĵon mi volas tie ĉi mencii jenon:

D^{ro} Alfons Nobel, kunredaktoro de la granda katolika ĵurnalo „Germania” kiu ĉeestis la kristana-demokratana kongreson de Marc Sangnier en Parizo [Dec. 1921], juĝas en „Hochland”, la plej granda katolika revuo en la germana lingva teritorio [1922, 5, kajero, pag. 544.]:

„En tiuj-ĉi tagoj iu Dro Metzger el Graz treege multon paroladis [en Parizo]. Li deziras organizi ion, kio estu „Katolika Internacio”. En sia patrujo Dro Metzger estas flankenulo [Aussenseiter]. Ĉiu granda unuiĝo timegas kunfandiĝi kun liaj celadoj. Mi havas la impreson, ke lia katolika internacio estu fariĝonta la „pendant” la socialista internacio. Sed ĉu ni ne havas efektivigita tiun-ĉi internacion en la plej ideala formo en la Eklezio? Kion mi ĝis nun vidis pri la agado kaj de Dro Metzger kaj de la delegitoj de la katolika pacligo nur havas negativan flankon. Ili opinias spirite alproksimiĝi al aliaj nacioj kritikante la patrujon.”

La ŝipo KM 6 enhavas kiel ŝipŝarĝon tre belajn aferojn (kia diferenco je KM 1 kaj KM 4!!!), nome „frata interpaciĝo, frata amo, unueco“ ktp. Sed kontraste je tiu enhavo la ŝipo KM 6 tre alte en sia masto (la titola surskribo) flirtigas la flagon de malamika malpaciĝo, malfrata maljusteco kaj malunueco (la titolo: „Oficiala organo de IKUE“). La karakteriza Metzgerana dueco, okulo-ŝapumado ktp. montriĝas denove en KM 6.

Spite tio nur laŭ kristana amo mi volas priparoli tiun ĉi ridindan „refuton“ de S^{ro} Mayr en KM 6:

„Episkopoj. Neniam la antaŭmilita IKUE havis la aprobon de ĉiuj episkopoj (= hierarĥio), sed nur de kelkaj. Ika trovis dum unu jaro la enkuraĝigon, subtenon aŭ benon de 30 ekleziaj eminentuloj, do dum unu jaro de pli ol la IKUE dum multaj jaroj.”

Se la KM-legantoj per supra „refuto“ estas konvinkitaj, ke mi nun estas plene venkita de S^{ro} Mayr, tiam mi vere kompatas ilin.

Same kiel mi, por akiri la aprobon de la denova eldono de EK en Nederlando, min turnis al „la Rezentanto de la katolika Hierarĥio en tiu ĉi Eparĥio“ (EK 124, p. 9), same la antaŭmilita IKUE kaj EK ĉiam faris ĉe ĉiuj siaj agadoj (EK 124, p. 10). Tiel ankaŭ la eldono de EK en Wien 1920 ricevis la aprobon de la „Rezentanto de la katolika Hierarĥio“ en la Eparĥio Wien (Kard. Piffl.). Plion la antaŭmilita kaj postmilita IKUE kaj EK ne bezonis, ne deziris: ĉar tio estis plene sufiĉa por ke IKUE kaj EK estu principeme katolikaj kaj eklezie aprobitaj.

Kiom ajn da Episkopoj (30 laŭ S^{ro} Mayr) donis „alkuraĝigon, subtenon aŭ benon“ — tamen mankas al Ika kaj KM, la eklezia aprobo de la antaŭ- kaj postmilita IKUE kaj EK; ĉar la reprezentantoj de la katolika Hierarĥio en la lando de la sidejo de Ika, nek en la lando de la centra oficejo kaj konferencoj de Ika, donis iam *tian* aprobon. —

Kaj mi pruvis, ke ĝenerale la „enkuraĝigo, subteno aŭ beno“ de tiuj ekleziaj eminentuloj estas akiritaj de Ika per (oni relegu EK 124, p. 47-54) Kaj malfeliĉe mankas precize la Episkopoj de la Ika-stariĝantoj mem (Poell, Lutkie, Heilker, Mielert, Metzger, Sappl kaj . . . Mayr)! La Germanoj prave dirus: „Schwamm d'rüber!“

La naiva senkulpa-infana fantaziaĵo de S^{ro} Mayr — ke „Ika trovis dum unu jaro la enkuraĝigon ktp, de 30 ekl. eminentuloj do dum unu jaro de pli ol la IKUE en multaj jaroj“ — jam *a priori* ŝajnos nekredebla al ĉiu iom mempensanta leganto de K.M. Kaj tiu fantaziaĵo kaj nepruvita aserto montriĝos ne konforma kun la historiaj faktoj.

Mi ne havas la tempon, sed eble iu samideano bonvolu esplori la *antaŭmilitan* EK, ekskluzive koncernante „enkuraĝigon, subtenon aŭ benon de ekleziaj eminentuloj“. — Kaj la rezultato estas gran-

dega surprizo — ne por ni, malnovaj Esperantistoj — sed por la novebakitaj Esperantistoj de la speco de S^{ro} Mayr, kiu verŝajne eĉ legis neniun antaŭmilitan EK-numeron, ĉiuokaze montris plej ofte, ke li scias tute nenion pri la historio de la katolika Esperantomovado — kvankam li tre agrable scias babili pri ĝi. Kiu el niaj legantoj volas fari tiun esploron? Oni menciui la nomojn kaj adresojn, kaj citu la paĝojn de la *antaŭmilita* EK — espereble KM fine, formetante tro da modesteco kaj humileco, ankaŭ publikigos la nomojn de siaj enigmaj „ekleziaj aŭtoritatuloj.”

Konklude: EK kaj IKUE de 1903 ĝis 1922 akiris ĉiam la esprimitan aprobon de la Reprezentantoj de la katolika Hierarkio en ĉiuj lokoj, kie okazis iu pli grava EK- aŭ IKUE- aĵero (gazeto, unuiĝo, regularo, kongresoj ktp.). Tio nepre mankis kaj mankas al IKa. Estas do, pro „kristana amo”, ke mi ĉe tiu ĉi „refuto” de S^{ro} Mayr en KM 6 ekkrias **nur** :

O! sancta simplicitas!

R. P. Philippe kaj IKa.

S^{ro} Mayr en KM 6 daŭrigas kredigi ke P^{ro} Philippe, la direktoro de la „Ligo Apostola” en Bruselo, estas la prezidanto de IKa. Mi havas leteron, en kiu P^{ro} Ph. skribis, ke li ne ankoraŭ oficiale akceptis (n^o 124, p. 38).

Plue en sia propra organo *Ligue Apostolique des Nations* P^{ro} Ph. neniam skribis ion pri IKa, krom en la Dec. n^o 1921, p. 364 (el franca lingvo tradukita):

„Internacio Katolika kaj Ligo Apostola.”

„1^e Ni ofte diris kaj deklaris, ke la sola vivebla internacio, se oni povus doni al ĝi tiun titolon, estas la *Ligue Apostolique*. Ĉion, kion ni aŭdis lastatempe, konfirmas niajn konvinkojn.

2^e Ni publikigis multajn artikolojn, petantajn la kreadon de internacio katolika, Per tio ni ĉiam komprenis: la alproksimigon, la grupigon, la unuigon tra la tuta mondo de la katolikaj fortoj. Ni ne donis eksterordinaran signifon al la vorto: „Internacio”, sed ni deklaris, ke tiu vorto malplaĉis al ni (vidu artikolon: Aprilo 1921). Ĝi estas destinita por malplaĉi pro tio ke, abstrakte, ĝi portas karakteron ne de katolikismo, sed de liberalismo aŭ de doktrinismo. La anoj de internacioj katolikaj ne donas sufiĉe da atento al tiu danĝero.

La Princo Vl. Ghika redonas mian penson en tiuj ĉi vortoj de perfekta klareco: „L’organizado internacia de la katolikoj devas esti organizaĵo katolika, ĝi ne devas esti internacio.

„La problemo troviĝas tie, aŭ pliĝuste la dilemo:

„Ĉu „internacio” estas la substantivo kaj „katolika” la adjektivo? La afero tiam estas erara kaj, laŭ ni, apenaŭ akceptebla. Ĉu „katoliko” estas la substan-

tivo, la substanco, kaj „internacia” la adjektivo, la specifa akcidento, la speciala tasko farota? Al mi ŝajnas tiam ĉio en ordo. Ni samopinias kiel tiuj, kiuj volas forŝovi ne la praktikan kaj sanan adjektivon, sed la substantivon, kie la dekliniĝo de la doktrino sin montras jam tuj de post la komenca formulo.

„Organizaĵo katolika de alproksimigo internacia, aŭ: a'proksimigo internacia de la katolikoj? Jes.

„Internacio Katolika? Ne.”..... ktp.

Citinte tiun ĉi artikolon de P^{ro} Philippe, de lia propra mano en lia propra organo, mi gratulas la „Internacion Katolikan” en kvadrato (ĉar tio ĉi ne estas la kromnomo, sed la propra ĉefnomo de IKa) kun la feliĉo havi tian.....laŭ S^{ro} Mayr almenaŭ....., prezidanton,

Sed mi ankoraŭ pli gratulas nian IKUE de Richardson, ĉar ĝi estas konforma al supraj sanaj principoj de P^{ro} Philippe, la direktoro de la, ĝisoste katolika kaj evangelia, „*Ligue Apostolique*”.

En unu el la venontaj numeroj mi preparolos sub la rubriko: „Katolika Vivo Internacia” tiun *Ligue Apostolique*.

Premio je 1000 Guldenoj.

T. e. kelkaj milionoj da Austriaj kronoj por la kaso de IKa estas ankoraŭ ĉiam disponeblaj. Oni scias, ke en KM 4 la Metzgeranoj tre „kristaname” diris kelkajn malveretojn. Mi skribis en EK 124 (aldono), ke, se ili povos **pruvi** tiujn malveretojn, mi disponigas por la kaso de IKa 1000 guldenojn.

Sajnas al mi, ke tio estas iom tro malfacila por la Graz'aj Sinjoroj. Kiel la vulpo de la fablo, ili trovos la alte pendantajn vinberojn tro vinagraj.

Pro tio S^{ro} Mayr en KM 6 preferas iri pli facilan vojon; kaj „laŭ la ekzemplo de la Dia Majstro” li komencas terure minaci:

„Sed se oni daŭras la disvastigadon de personaj kalumnioj kaj ofendoj, ni ne hezitos transdoni la aferon al la juĝejoj de la koncernaj ekleziaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj, por ne malutili la katolikan aferon.”

La „kalumnioj” kaj „ofendoj” tre facile povas esti forigataj per la „sento de justeco” de la Prezidanto de IKa D^{ro} Giesswein, kiu skribis jam en Aŭgusto 1921 „al D^{ro} Metzger, ke Katolika Mondo ne estas rajtigita almeti: „Oficiala Organo de IKUE”.....” (EK 124, p. 40). — Ĉar tiu titolo estas la *laŭleĝa aŭtorraĵo*, do propra posedaĵo de „Espero Katolika”.

Mi ankoraŭ ĉiam konfidas je la honesteco de IKa, ke ĝi promove ~~mal~~aperigos tiun maljustecon.

La plej bona pruvo, ke IKa ne nur kortuŝante babilas en KM 6 pri „katolika spirito de pacemeco kaj frata amo”, sed praktike

aplikas tion, estos, ke ĝi *komencu* per forigo de la ĉefkaŭzo de la militdeklaro inter EK kaj IKa kaj de la ĉefmalhelpo por la reveno de la paco.

Resume: la paco tuj regos, kiam ĉiuj donos al EK kaj IKUE, kio estas de EK kaj de IKUE; al IKa kaj KM, kio estas de IKa kaj KM; al la imperiestro, kio estas de la imperiestro; kaj al Dio, kio estas de Dio.

D^{ro} Sm.

Oficialaj Komunikoj.

La Kongres-Regularo.

En tiu ĉi „E. K.”-n^o ni havigas al la legantoj la kongresregularon, kiu jam aperis en „E.K.”-n^o 102 (Januaro 1914), pretigita por „Nia Kvina” en Lourdes kaj en EK. Junio 1920, pretigita por „Nia Sesa” en Hago. La teksto estas precize la sama.

§ 1 IKUE celas

per katolikaj internaciaj Kongresoj priparoli internacian kunlaboron, por servi la katolikismon laŭ aprobo de la Eklezia Aŭtoritato.

§ II Aranĝoj antaŭkongresaj.

1. La traktotaĵoj de la kongreso estu:
 - a) temoj proponataj de la Estraro de IKUE:
 - b) proponoj de IKUE-anoj, de „E.K.”-abonantoj aŭ de kongresanoj.

Al ĉiu temo kaj propono estu aldonata deziresprimoj.

2. La proponoj de sub 1 b devas esti komunikataj al la ĝenerala Sekretario kvin monatojn antaŭ la 1^a de la kongresmonato.

3. Post zorga esploro la Estraro de IKUE kunmetas programon el ĝiaj propraj temoj kun la aprobitaj proponoj de sub 1 b. Ĉiu malaprobita propono estos resendata al ĝia aŭtoro sen deviga motivo.

4. La provizore fiksita programo estas sendata al la Episkopo, en kies eparĥio okazos la kongreso.

5. Poste la Estraro de IKUE presigos en „E. K.” kiel eble plej baldaŭ la resumojn kaj deziresprimojn episkope aprobitajn.

6. Ĝis du monatoj antaŭ la kongreso la membroj de aliĝintaj Ligoj havas rajton, ensendi al la ĝenerala Sekretario ŝanĝproponojn.

7. En la lasta antaŭkongresa numero de „E. K.”, se eble, la Estraro presigos la de ĝi akceptitajn kaj episkope aprobitajn ŝanĝojn.

8. La Estraro de IKUE disponigos por disdono en ĉiu kunsido de la kongreso presitajn resumojn, deziresprimojn kaj ies ŝanĝojn.

§ III Aranĝoj dumkongresaj.

1. La Estraro de IKUE estu la kongres-estraro, laŭbezone sin pliigante. En la unua laborkunsido estu elektata kongres-raportisto.

2. La kunvenoj de la kongreso estas publikaj, escepte, se la kongreso formale decidas la malon.

3. Al voĉdono nur rajtas la kongresanoj, t.e. la aĉetintoj kongreskarton (Sm. 2.—), escepte en kunsido, kiu estas ĝenerala kunveno de IKUE, en kiu nur rajtas voĉdoni la membroj de la internaciaj komitatoj (Vidu Statuto § X.)

4. La nomoj de la kongresanoj estos enkribataj de la kasisto en alfabetan liston.

5. Por kontroli la nombron de ĉeestantoj voĉdonrajtigataj, la kongresanoj enkribos siajn nomojn ĉe la sekretario antaŭ la komenco de ĉiu kunveno.

6. En ĉiu sekvanta kunsido antaŭ la priparolado de iu temo aŭ propono estos voĉdono pri la skribita kaj legita raporto de la antaŭa kunsido.

7. La kongreso rajtas ŝanĝi laŭbezone la vicon de la traktotaĵoj, aŭ resendi ilin al sekvanta kongreso.

8. Neniu alia propono aŭ proponŝanĝo estos priparolata sen unuanima konsento de la estraro; voĉdono neniam okazos pri ĝi.

9. Dum la diskutado la oratoroj parolos laŭ la vico de sia enskribiĝo ĉe la Prezidanto de la kunsido. Iu, ne enskribita, ne parolu.

10. La paroladoj pri temoj kaj proponoj daŭru ne pli longe ol duonan horon. Pri la sama temo neniu parolu pli longe ol dek minutojn kaj unufoje. Tiu limigo ne koncernas la kongresestranojn nek la paroladintojn.

11. Kiam ĉiuj enkribitoj por la diskutado estas havintaj sian vicon, la paroladinto povas dum minutoj respondi.

12. Se la diskutado devas daŭrigi, la enkribitaj diskutintoj parolu ne pli ol 5 minutojn, la respondonta paroladinto ne pli ol 10 minutojn.

13. La voĉdono pri la deziresprimoj fariĝu per manlevado kaj en provaĵo kaj kontraŭprovaĵo; laŭbezone la voĉoj estas laŭte kalkulataj de la prezidanto. La plimulto decidas; se la voĉoj estas egalnombraj, la prezidanto decidas.

14. En la lasta laborkunsido de kongreso oni voĉdonu pri

la lando kaj la tempo (monato) de la sekvonta kongreso, tiama-
niere, ke el la du landoj kaj monatoj, kiuj havos la plej multajn
voĉojn, la Estraro de IKUE decidis post la kongreso.

§ IV. Aranĝoj postkongresaj.

1. Tuj post la kongreso la Estraro de IKUE publikigos
Oficialan Raporton pri la tuta kongreso en la proksima numero
de „E. K.”.

2. La Latine tradukitaj deziresprimoj estu sendataj de la Prezi-
danto al la Sankta Seĝo kaj al la Ĉef-episkopoj de ĉiuj landoj.

La Kongres-Regularo kaj „Nia Sepa”.

En ĉi-tiu numero de EK aperas la Regularo por nia proksima
kongreso. Ni ĝin presigis neŝanĝita por havigi al la malnovaj
abonantoj la saman tekston kiun ili jam pristudis antaŭ Nia Sesa
en Hago. Oni tamen komprenos ke por la nunjara kongreso ni
devas iomete ĝin ŝanĝi. Ĉar la Regularo ne estas speciale farita
por ĉi-tiu jaro, sed ĝiaj artikoloj ankaŭ estos valoraj por la sek-
vantoj jaroj, ni *pritraktos* nur la *komunikitan* tekston kaj volonte
jam ricevos proponojn plibonigajn, al kiuj mi petas la legantojn
serioze primediti kaj priparoli ilin en nia organo, por ke la teksto
estu bone pristudita jam antaŭ la kongreso.

Jen la esceptoj kiujn ni decidis fari por ĉi-tiu jaro:

§ II sub 2: La proponoj de sub 1 b devas esti komunikataj
al la ĝenerala Sekretario **antaŭ la 1^a de Majo 1922.**

sub 6: Ĝis la unua de Julio la membroj de aliĝintaj Ligoj,
E-K-abonantoj aŭ kongresanoj havas rajton, ensendi al la ĝenerala
Sekretario ŝanĝproponojn. P. A. Sch.

Pri „Konsuloj de IKUE”.

Pro J. Lintl el Pfakofen apud Regensburg skribas:

„Eble ni bezonus mallongan programon pri la devoj de la „Konsuloj”
„La devoj miaopinie estos preskaŭ la samaj aŭ similaj kiel tiuj de
„la UEA-aj delegitoj, nome: akurate respondi la informpetojn de
„la membroj, regule enkasigi la kotizaĵojn, kaj zorge plenumi la
„administran laboron rilatotan al sia ofico, ekz. preni sur sin abo-
„nejojn, ktp. Kompreneble bone li eklernu Esperanton, li legu la
„oficialan organon EK. kaj interesiĝu je la interna disvolviĝo de
„nia movado. Antaŭ ĉio lia tasko estos la varbado de novaj
„membroj. Al tio ankaŭ helpu ĉiuj ĝisnunaj membroj. La pros-

„pereco de la katolika internacia Esperanto-movado dependos de „forta IKUE. Forta ĝi povas esti nur, se ĝi havas multajn mem- „brojn en ĉiuj landoj.”

Mi tutkore aprobas ĉi-tiujn proponojn de Pro Lintl pri la tasko de la konsuloj de IKUE. Provizore do ili agu en tiu direkto, kaj dum nia kongreso ni povas oficiale starigi la „servan organizadon“ Ni tiam ankaŭ fiksos la kotizaĵon de nia Unuiĝo, afero malfacila pro la ankoraŭ granda valutdiferenco en la diversaj landoj. Sed tial estus tre dezirinde, ke la legantoj de EK jam nun preparolu tiun (kaj similajn) aferon en nia oficiala organo. Ni t.e.: ĉiuj, kiuj interesiĝas pri nia I.K.U.E. kaj volas kunlabori al ĝia florado parolu pri nia timo, pri nia ĝojo, pri nia espero rilate nia kara unuiĝo, tiel ni despli bone sentos, ke forta ligilo nin unuiĝas, ke vere ni estas unu, kaj kune laboras al alta tasko por la honoro de Dio.

P. A. Sch.

Landaj Oficejoj de IKUE.

Pro Dro Hotzelt proponas al ni, starigi en Germanujo Oficejon de nia IKUE. Li volonte akceptos la Oficist-econ, se ni aprobas tion. Laŭ nia opinio tiu propono estas tre aprobinda. La tasko de la Oficejo povas esti jena:

Al ĝi oni direktu ĉiujn oficialajn komunikojn pri IKUE, ekzemple: raportojn pri la agadoj, membro-nombroj, elektoj en la diversaj grupoj. Al ĝi oni anoncu sin kiel abonanto de EK kaj sendu la abonmonon. Ĝi direktu la enlandan propagandon por starigi novajn grupojn, serĉu bonajn paroladistojn por paroli en propagandkunvenoj, sendu komunikojn pri IKUE (nacilingve) al la ĉefaj ĵurnaloj, ktp. Bone rimarku ke ĉio-ĉi nur estas propono kiun ni povas ankaŭ preparoli dum Nia Sepa, sed al mi ŝajnas tre utile ke ni jam nun komencas agadi jenmaniere kaj tial mi petas — se ankaŭ miaj kunestraranoj konsentas pri tio — ke Sro Hotzelt bonvolu akcepti la Oficistecon de IKUE por Germanujo, kaj ke li komencu agi laŭ la suprenomitaj proponoj. Ni klopodos ankaŭ trovi tian Oficejon en aliaj landoj kaj petas la legantojn de EK sciigi al mi taŭgajn adresojn por tiu celo. Ni preparolos dum Nia Sepa nian organizadon, sed jam nun organizu.

P. A. Schendeler,
Prez.-Sokr. de IKUE.
Prino Hendrikstraat 30^E
Eindhoven.

VII Internacia Katolika Kongreso de IKUE

„Nia Sepa“

Dua Komuniko

Laŭ decido de la Prezidanto de IKUE la lasta templimo por alsendo de proponoj pritraktotaj kaj vobdonotaj dum **Nia Sepa** (vidu kongresregularon § II sub 2) estas la 1^a de Majo 1922.

Ĉiu do, kiu intencas partopreni al Nia Sepa, kaj ankaŭ tiu, kiu ne ankoraŭ certe scias ĉu li povas partopreni, kaj kiu havas proponon (al kiu oni aldonu resumon en la formo de „deziresprimo“) alsendu ĝin **antaŭ la fiksita dato**.

Ne ankoraŭ estas definitive fiksita la loko, kie okazos Nia Sepa. Oni proponis, krom *Dantzig*, ankoraŭ *Köln*, *Bruselo* kaj *Antverpeno*, sed la proponintoj ne loĝas en tiuj urboj, kaj ni ne havas certecon ĉu tie troviĝas suface da fervoraj IKUE-anoj, kiuj dezirus preni sur sin la gravan taskon de organizo de kongreso. — Ankaŭ oni proponis *Lourdes*. Nia Kvara estis tie bonege antaŭ-preparita de nia neforgesebla Claudius Colas kaj sub la protektoreco kaj honora prezideco de L.E.M. Mons^{ro} Schopfer, Episkopo de Lourdes kaj Tarbes; sed la kongreso ne povis okazi pro la mondmilito. Certe tiu loko treege allogas kaj iufoje ni devas tie certe kongresi! — Serioze oni ankaŭ proponis *München*, la ĉefurbo de Bavarujo, por ĝia suface centra lokiĝo ktp. Sed jen opinio de P^{ro} Lukas, la prezidanto de la loka E-grupo en München:

„Nepre honore por ni estas la instigo, kunvenigi „Nian Sepan“ en Münhen; sed malgraŭ tio ekzistas aŭtoritataj kaŭzoj kiuj kontraŭstaras tion. La Oberamerĝaŭaj pasioludoj, la Industria Ekspozicio („Gewerbeschau“), la kunveno de la Germanaj Katolikoj tian amason da gastoj alportos Münhenon, ke ĉe ĉi-tiu konkurso Esperanto tute malaperus; por nia afero estas pli profita je pli senbrua tempo, dum kiu ni povus plibone imponi. Plue ĉiuj lokoj por kunvenoj kaj ĉiuj loĝejoj jam hodiaŭ estas laŭabone dungitaj, kaj krome oni kalkulas ankoraŭ per tiaj sezonprezoj, ke „Nia Sepa“ en Münheno la samideanojn el ĉiuj landoj nur malfacile kontentigus. — Por alia jaro mi mem plejvarme proponus Münhenon kiel kongresurbon, kaj ni estos fleraj, se ni povus saluti en nia Bavara ĉefurbo la katolikan esperantistaron“

Ankaŭ estas proponita *Wien*, kaj tiu nomo estas ĝenerale tre simpatie aplaudata. Mi petis decidajn informojn al la Prez. de la A.K.L.E. P^{ro} Meŝtan, kaj atendas ankoraŭ lian respondon. —

Fine oni nomis *Nederlandan urbon*, ĉar en Nederlando dum Nia Sesa estis defiktita nia movado; la sama lando nun plene riparu la bedaŭrindan eraton dum Nia Sepa. Tri urbojn oni proponis, el kiuj unu certe estas tre taŭga kiel kongresubo. Pro

la alta valuto en Nederlando kompreneble por eksterlandanoj la loĝado kaj restado devus esti tre malmultekosta ĝis senpaga, kaj kiel eble plej ilia alvojaĝo devus esti faciligata.

Pri la dato de Nia Sepa oni proponis ankaŭ okazigi ĝin post la XIVa Un. Esp. kongreso, do post la 15a de Aŭgusto.

Certe baldaŭ definitive estos fiksitaj la loko kaj la dato de „Nia Sepa“. Se oni havas ankoraŭ proponojn, konsilojn, ideojn, oni sciigu ilin kiel eble plej baldaŭ.

La kongres-sekretario:
D^{ro} Smulders.

Pri Pacproponoj.

Ĝis la last-ebla momento mi atendis antaŭ sendi ĉi-tiun artikoleon al E-K, por informi la legantojn plej detale pri la stato de la pac-intertraktado post la proponoj de S^{ro} Sappl, kiujn preparolis D^{ro} Smulders en la antaŭa kajero de E.K. Mi ĝis la lasta momento atendis de la Graz'a Unuiĝo respondon per kiu ni povus komenci la intertraktadon. La letero de S^{ro} Sappl, jes, enhavis tre bonintencajn proponojn, sed nenio indikis, ke tiuj proponoj venis de la Estraro de la Graz'a Unuiĝo. Kontraŭe ĝia tuta enhavo nur pensigis min ke S^{ro} Sappl. nur individue agis. Se tio estus la vero, certe mi ŝuldas grandan dankon al li pro liaj klopodoj, kaj tial mi tuj tiasence al li skribis. Mi tamen rimarkigis lin ke nek mi, kiel prez-sekr., nek doktoro Smulders kiel redaktoro de EK, nek iu ajn membro de IKUE povas propramove decidi pri la proponoj, sed ke tion faros la Estraro je la nomo de nia Unuiĝo kaj ke poste la ĝenerala kunveno de IKUE findecidos. Mi tial petis lin, ke li bonvolu havigi al mi la pruvon ke li faris tiujn proponojn, komisiite, aŭ almenaŭ kun la konsento de sia estraro. Ĝis nun tamen mi al tiu letero neniun respondon ricevis. Dume, en la marta KM. 6 estis aldonita papereto, sciigante la leganton, ke oni kun ni intertraktas. Kial oni ne tion komunikis en KM mem? El komuniko en KM la informito povas kompreni ke dum la intertraktado oni sin detenas de ia kontraŭbatalo al nia IKUE. Mi devas rimarkigi tie-ĉi, ke tiun armilriponon ni ne petis. Kontraŭe, ni eĉ estus tre feliĉaj, se IKa refutus ĉiujn niajn kulpigojn, ke ĝi pruvus ke ni en ĉiuj punktoj eraris, kaj ke ĝi estas senkulpa. En tiu okazo ni tuj prezentus al IKa kaj ĉiuj kulpigitaj personoj nian pardonpeton, oferante al ili nian tutkoran helpadon....

Ĝis nun oni tamen refutis neniun el niaj kulpigoj, kaj per la

silentado de KM ili nun ŝajnis ke ili ne volas sin defendi. Ni tion bedaŭras, ne, ĉar ni serĉas malpacon, sed ĉar nun regadas inter multaj bonvolaj samideanoj la opinio ke ni kalumniis kaj sen neceso atakis personojn kaj aferojn. Tio estas eraro. Ni silentis tiom longe ĝis kiam plua silentado estus danĝeriga, eĉ mortiga al nia afero: la organizado de la katolikaj Esperantistoj tutmondaj.

Oni tion bone pripensu.

Sed pri alia grava afero mi ankaŭ devas atentigi.

Haltigante la publikan sindefendon en KM (kiun oni tamen ne ankoraŭ komencis, se ne per asertoj anstataŭ pruvoj) oni nun de ia flanko des pli akre atakas personojn el niaj rangoj, en privataj leteroj, tiel ke la atakitaj personoj do ne povas sin defendi. Mi tion eksciis de tute kredindaj personoj. Ĉu tio estas la vojo al paco? Karaj samideanoj, ĉu kontraŭuloj, ĉu kunuloj! Se vi volas ataki nin, faru tion senkaŝe, kiel ni faris. Ni respondos kaj konfesos kulpon se kulpon ni havas. Se vi ricevas leterojn en kiuj oni klopodas kulpigi personojn, sendu tiujn leterojn al la kulpitoj por ebligi al ili sin defendi. Se niaj kontraŭuloj preferos silenti, bone, ni volas pravigi tion. Sed tiuokaze ili ankaŭ en privataj leteroj evitu ĉiun malamikaĵon. Se niaj kontraŭuloj ne volas silenti: ankaŭ bone, sed tiuokaze ili batalu kun honestaj armiloj!

P. A. Schendeler.
Prezidanto de IKUE.

Ĉu laŭrajte?

En Esperanto- Praktiko n^o 37 mi legas sub la titolo „Tutmonda Adresaro Katolika“ la jenan sciigon:

„La Internacio Katolika (IKa) kune kun I.K.U.E. restarigita ekprenas la iniciaton por enkonduki per ĉiuj iloj Esperanton en la katolikaro. Por praktike montri la nunan disvastiĝon en katolikaj rondoj, ĝi volas kiel eble plej bandaŭ eldoni *tutmondan adresaron katolikan* enhavantan ĉiujn adresojn de la jam en la mondo ekzistantaj Esperantistoj katolikaj. Do ni kore petas ĉiujn samideanojn katolikajn, tuj sendi sian ekzaktan adreson, aldonante la profesion kaj eventuale la fakojn, pri kiuj ili volas korespondadi aŭ interŝanĝi.“

Rilate al tiu komuniko ni devas jenon rimarkigi:

1. La Internacio Katolika kune kun IKUE restarigita... La IKa tie-ĉi ŝajnis kvazaŭ ĝi, kaj la IKUE restarigita estus du sendependaj institucioj. Nesuspektemulo do kredus, ke *nia* IKUE kun IKa kunlaborus por kunmeti tiun adresaron. IKa tial devigas nin tie-ĉi ripeti, ke ni havas nenian rilaton kun ĝi, kaj ke nia Unuiĝo jam en 1914 eldonis libreton titolitan: „Tutmonda adre-

saro de katolikaj Esperantistoj...” verkitan de la tiam sekretario de IKUE, pastro Bianchini „cum permissione ecclesiastica” (kun permeso eklezia). La rajto por eldoni tian adresaron do ne estas al Ika sed al nia „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.”

2. Ika eble volas respondi ke ĝi ne intencis diri ke ĝi la adreson eldonos kun ni, sed kun la Graz'a IKUE. Al tio ni respondas ke EK 124 pruvis ke tiu IKUE ne havas ekzistadrajton, kaj plue, aliloke Ika pretendas, ke tiu „Graz'a” IKUE estas parto de Ika. Kial do ĝi diras ke ĝi kun IKUE eldonos la adresaron? Se tiu IKUE ĝin eldonus (senrajte), ankaŭ tiam la Graz'a IKUE estus la kuneldonanto. Ĉu do la komuniko ne estas erariga?

3. Sed, oni eble rediros, ni ne intercas eldoni „tutmondan adresaron de katolikaj Esperantistoj” sed simple „tutmondan adresaron katolikan”. Ree erarigo. Se vi deziras tutmondan adresaron katolikan, vi petu la adresojn de katolikoj en la tuta mondo, ĉu esperantistaj, ĉu ne-esperantistaj, sed, se vi nur serĉas la adresojn inter la katolikaj esperantistoj vi trompas la ceterajn Ika-anojn, ilin kredante, ke la adresitoj ankaŭ en alia lingvo ol Esperanto deziras korespondadi.

4. Plue la celo de tiu adresaro estas dueca: laŭ la komuniko en E-P oni ŝajnigas ke ĝi celas enkonduki Esperanton en la katolikaro (per ĉiuj iloj!), dum la celo de la adresdonantoj simple estas la korespondado en Esperanto. La komunikado ĝin nomas: tutmonda adresaro katolika, la eldono mem havas la titolon: „Adresaro de la internacia interŝanĝado inter katolikaj gejunuloj, eldonita de Mondjunularo katolika. Do denove: ne Ika kun la IKUE restarigita (vidu supre) eldonas la adresaron sed tria instituto: Moka. Ĉu oni „mokis”?

For la dueco! Kiu volas servi la katolikan aferon per Esperanto, tion faru per la nura IKUE de Richardson, kies nura oficiala organo estas Espero Katolika. Kiu deziras servi la katolikan aferon nure kiel katoliko, kunlaboru al la starigo de Internacio katolika laŭ la vojo kiun indikas la ekleziaj aŭtoritatoj, al neniu altrudante ian lingvon, neniel klopodante kapti iun per ruzaj vojoj en Esperanto-reto. Propagando por la katolikaj ideoj, akcelado de la katolikaj interesoj nure per Esperanto nur apartenas al internacia katolika unuiĝo esperantista, t.e.: IKUE.

P. A. Schendeler.

Prezidanto de I.K.U.E.

Pri la Dua Ika-kongreso.

En EK 125, p. 116 mi presigis, ke ĝi ne okazos en Luxemburg, ktp. — Fidindaj personoj sciigas al mi 14-3-22, ke ĝi tamen okazos en L. — Skribante tiujn ĉi liniojn, mi ne ankoraŭ kun plena certeco scias, ĉu tio estas vera.

Jen la historio. Ni ricevis de la Episkopo de L. leteron, datumitan 14-1-22.

El ĝi mi citas: „La Ika-kongreso ne okazos en Luxemburg... Kiam D^{ro} Metzger... skribas „kun la aprobo de la Episkopo de L.”, tiam li uzas intence duŝencan vorton. Jen la vero.... Tio estas ĉio.... mi nur donis al li mian provizoran buŝan permeson.... Intertempe li presigis, sen mia antaŭscio, la anoncon (de la kongreso) en lia gazeto kaj ja kun la erariga esprimo: „kun aprobo ktp”. Pro tio mi skribis al li tuj la 11-1-22: „La kongreso ne okazos en Luxemburg”. Tio ĉi estas mia lasta vorto.... La afero estas tiel definitive finigita. Espereble D^{ro} Metzger nun malokazigos la kunvenon, kiu ne okazos en Luxemburg.” (Subsignita: † Petrus, Bischof von Luxemburg). —

Pro tiu „al ni sciigita novaĵo” mi „simple konstatis” en EK 125: „La dua Ika-Kongreso ne okazos en Luxemburg kaj ne havis la aprobon de la tiea Episkopo.”

Tio estis tiutempe la nuda vero, kaj ankaŭ KM 6, eljrinta post 15 Februaro, zorgeme silentas, en la komuniketo pri la dua Ika-kongreso, pri Luxemburg kaj pri Episkopa aprobo.

Povas esti, ke poste la afero denove estas aliigita. Tamen ĉiu devas konsenti, ke mi prave „simple konstatis” en EK 125 tion, kion mi konstatis; pro la plej decida letero, el kiu mi supre citis. Ĉiu dubanto povas ĉe mi legi la originalan leteron, kiu estas en mia posedo.

D^{ro} Smulders.

Teknika Religia Vortaro

de P^{ro} J. Bianchini, estos baldaŭ daŭrigata en nia EK. Ankaŭ baldaŭ aperos la daŭrigon de la *Historio de la katolika Esperantomovado* de P^{ro} Meŝtan (La komenco de tiuj ĉi du interesaj kaj gravaj verkoj troviĝas en la Wien'a eldono de EK).

Recenzo.

Katolika Revuo; por religiaj, socialaj, sciencaj kaj literaturaj aferoj. — Redaktoro P^{ro} Johano Kosma. — Kun la permeso de la Eklezia Aŭtoritato.

Kion diri pri tiu ĉi nova katolika Esperanto-gazeto?
I. Unue mi volas ĝin priparoli, kvazaŭ mi ne scius ĝian ten-

dencon, ĝian aŭtoron, ĝian enhavon. Estas certe, ke en tuta Esperantujo pri tio regos unuanima konsento, ke por la Katolikoj tri katolikaj gazetoj estas tro; ke la tria certe estas tre granda superfluaĵo. La nombro da kat. Esperantistoj kaj ilia financa povo estas tro malgrandaj, por ke ili povos sufiĉe subteni tri gazetojn.

La ekzisto de la malnova katolika gazeto „Espero Katolika”, samtempe kiel organo kaj ligilo por la malnova „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista” (IKUE) estas memkomprenebla. — La internacia organizo IKa ne povis sin kontentigi je supra gazeto; tamen la prudenteco kaj solidareco estus konsilintaj uzi provizore unu komunan gazeton; sed ni konsentas ke pro ekleziaj cirkonstancoj (ekz. en Nederlando) IKa nuntempe bezonas propran gazeton. — La tria gazeto tamen vidigas neniun bezonon. Kiam oni tralegas ĝin, la unua rimarko estas: Sed ĉio, kion ĝi enhavas, povus esti presita en la du ekzistantaj gazetoj EK aŭ KM. por diversiĝi kaj variigi ilian enhavon. Pro kio la eldoninto eldonis ĝin? Superfluaĵo! Nebezonaĵo! Kaj dum la nuna malgranda disvastiĝo de Esperanto inter Katolikaj ĝi nur povas disigi la fortojn, malfortigi la ekzistantajn organizaĵojn kaj gazetojn; ĝi estas malutila por nia movado.

II. Kiam ni enrigardas ĝian enhavon, tiam ni estas malagrabla trafita per la fakto, ke tiu ĉi nova katolika gazeto — anoncanta sin kiel tute sendepandan de kiu ajn organizaĵo nacia aŭ internacia — tamen tuj de la komenco montras grandan antaŭjuĝemon kaj partiecon. Rilate al nia EK ĝi elmontras supraĵon de juĝo kaj unuflankecon de prigujo. Ĝi montras sin rekte malamika al ni, emfaze akcentante tion, kion ĝi opinias malaprobinda kaj tute silentante pri tio, kio estas aprobinda. Ĉar nia EK 124 certe ankaŭ enhavas la lastan. Tion povas nei neniuj. La preskaŭ ĝenerala aprobo de nia agado (la „kelkaj esceptoj konfirmas la regulon”) certigas nin, ke en la nova gazeto parolas homo antaŭjuĝema. Mi povus citi la nomojn de multe pli aŭtoritataj pastroj ol P^{ro} Kosma. Mi nur volas citi leteron, kiun mi ricevis post la apero de la nova gazeto, kaj kiu samtempe enhavas prijuĝon pri ĝi. Estas letero de la konata kaj ŝatata Paroĥestro Lintl en Plakofen, kies leteron mi ricevis 3 Marto 1922. Jen kion li skribis:

„La numeron 124 mi ne nur legis, sed akurate trastudadis; mi elkore gratulas vin pro viaj ĝisfundaj kaj brilaj defendoj de IKUE de Richardson. Sendube ĉiuj purrasaj IKUE-anoj vin tutkore dankos por ĉi-tiuj detalaj klarigoj. Estis absolute necese, ke foje estis energie parolate kun la aŭtokrataj Metzgeranoj. Ankaŭ ankoraŭ nun — dum la momentaj traktadoj — oni devas sin gardi kontraŭ ili,” ktp.

Pro Kosma resumas: „la dikega kajero ne enhavas ion, krom la plendoj kaj insultoj kontraŭ D^o Metzger kaj aliaj IKa-anoj.“ —

Plue: „Tion, kion oni povas rakonti en dek da linioj nia . . . EK laŭtkrias tra 80 paĝoj.“ „Neniel utilo por la katolikaro.“

Supre P^{ro} Lintl kvazaŭ donas respondon: la absoluta necesego energie agadi — ĝistundaj kaj brilaj defendoj . . . detalaj klarigoj — sendube tutkora danko de ĉiuj purrasaj IKUE-anoj. Sed la klarigon de la sintenado de P^{ro} Kozma donas P^{ro} Lintl jenmaniere:

„*Postskribo.* Je mia granda surprizo mi hodiaŭ ankaŭ ricevis la 1^{an} kajeron de nova *katolika gazeto*, nome „*Katolika Revuo*“. . . Sendube via moŝto estos ricevinta ĉi-tiun novan gazeton, kiu ŝajnas esti sufiĉe „*Metzgerana!*“

III. Se nia kolego KM eble estos afabla al KR pro II, mi esperas tamen pro I, ke IKa kun ni malaprobos ĝian aperon. Estas antaŭtempa naskiĝo, kaj la naskito verŝajne havos malsufiĉe da vivfortoj por longe vivi. Ni almenaŭ tute ne povas rekomendi tiun sendube superfluan, trian katolikan, Esperanto-gazeton!

D^{ro} Sm.

Pro kio la Papo ne malpermesas la militon?

Se vi faras tiun ĉi demandon, *ĝeneralsence*, vi povus ĝin ankaŭ ŝanĝi en la ankoraŭ pli ĝeneralan formon: „Pro kio la Dek Ordonoj ne malpermesis la militon“. Ĉar ĝenerala leĝo, kiu devenas de la Papo, neniam estas alia afero. krom dekreto, deklaro, apliko aŭ jesigo de la Dia moralleĝo, kaj trovas do iumaniere en la Dek Ordonoj sian originon.

Al tiu tre ĝenerala demando povas esti respondata jene:

Malpermesi la militon estas rilate al specialaj interesoj de popoloj kaj ŝtatoj nejusta, kaj rilate al la komunaj aŭ ĝeneralaj interesoj de la homaro malutila. (1)

Ke mi devas formuli tiun tezon, estas unu el la malĝojaj sekvoj de la origina peko.

Dio malpermesis ĉiun maljustecon. Tamen ekzistas kaj daŭre ekzistos homoj, kiuj obeante sian propran malbonan volon kaj malobeante la volon de Dio, faros maljustecon, kaj per tio — en multe da okazoj — ankaŭ malutilos al siaj kunhomoj.

Nu, kontraŭ maljusteco alfarita, ĉiu rajtas kontraŭstari.

Same kiel individuo, tiel ankaŭ ĉiu popolo, ĉiu ŝtato rajtas sin defendi, kiam li estas maljuste atakita, aŭ ŝirmigi siajn rajtojn, kiam tiuj ĉi senmotive estas minacataj; kaj se tiu defendo kaj

(1) Mi petas miajn legantojn bone legi tiujn ĉi vortojn kaj ne rigardi min pro tiu tezo kiel militemulon. La malo de mia tezo ne estas, ke milito estas necesa kaj utila, sed jes estas, ke la *permesiteco* de militado estas justa kaj en kelkaj cir-konstancoj utila. Per tiu ĉi rimarko mi deziras antaŭveni ĉiun malkomprenon.

ŝirmigo ne povas okazi aliamaniere krom per perforto, tiam ĉiu homo kaj ĉiu ŝtato ankaŭ rajtas uzi perforton (aŭ militi), kondiĉe, ke la atenco al lia rajto kaj la malprofitoj, kiuj necesas sekvas el tiu perforto, egaligas unu la alian, kaj kondiĉe ke tiu perforto ne degeneras en ne necesa krueleco.

Tia estas la rajto, kiu sin apogas sur la natura ordo de la nuna homara generacio. Se nu la, t. e. ĉiu milito estas malpermesita, tiam ankaŭ estas malpermesita justa milito: sed tio senigas iun je permesita rimedo por ŝirmi liajn rajtojn kaj do estus maljusteĉo, se ne pli alta intereso postulus, por ĉiam rezigni la uzon de tiu rajto.

Sed tio ne estas tiel. Pli altaj interesoj precize postulas, ke la aplikado de tiu ĉi rajto je defendo, ankaŭ kun perforto, restu permesita. (Atentu mian substrekon!)

Komparo tion klarigos.

Kiam vi estas neatendite atakata de mortigisto aŭ kiam ŝtelisto perforte eniras, kaj kiam ne estus permesita al vi por defendi vin per konvena perforto; kio estus la sekvo de tio? Ne nur ke vi perdus vivon kaj proprajn — viajn efektivajn rajtojn — sed ankoraŭ io multe pli alta perdiĝus. Se iu ne rajtus — se necesas per perforto — sin defendi, tiam ŝtelistoj kaj mortigistoj ankoraŭ pli maltime agadus kaj en multaj okazoj simple havus plenan liberecon: per tio estus kreita serioza endanĝerigo por la publika ordo kaj por la trankvila socia vivo.

Nu, kio tie ĉi estas aplikebla al individuo, tio ankaŭ estas aplikebla al ŝtato aŭ al popolo, kaj ankoraŭ des pli motive, pro tio ke mankas al la ŝtato la ŝirmado, kiun trovas la individuo ĉe la burĝa registaro kaj ĝiaj juĝejoj kaj polico. Ŝtato ĉe nenia potenco trovas protektadon kontraŭ maljusta atako.

En la kunvivado de la popoloj, ĝenerala malpermeso de ĉiu perforto, do ankaŭ de justa milito, lasus ankoraŭ pli da libereco al la senbrida egoismo, kiu tiel serioze minacas la paceman kunvivadon de la popoloj. Tiam la situacio en la mondo estus ankoraŭ pli malbona, ol ĝi estas jam nun.

Tion vi trovas jesigita en la historio de la lasta duona jarcento. Certe estas vere, ke la supermezuraj armigadoj de la reciproke konkurantaj registaroj, kaj ke la densa reto de kontraktoj kaj traktatoj inter la ŝtatoj, degenerigis la mondmiliton ĝis tia konfuza amplekso kaj en tia abomeninda krueleco; sed ankaŭ estas vere, ke la certeco, ke ĉiu ŝtato estis preta por defendi sin ĝis ekstremo kontraŭ ĉiu atako, devigis la abominandan egoismon, kiu regis la „altan” politikon, prokrastigi la faktan atakon kaj konservi dum longaj jaroj la pacon.

Tiel la permesiteco de justa milito ne nur estis defenda rimedo de ĉiu aparta ŝtato, sed ankaŭ efektive komuna profito por ĉiuj. Kaj tio estas precize la tezo, kiun ni formulis.

(Daŭrigota)

Pro Th. M. B. Dekkers.